

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 18/02/2021 Kvincentdekoka eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Entute **815,700** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **293,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **243,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **218,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **61,700** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)


Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2021)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO EL LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).

N.ro 23 de "Por Komencantoj".



Ĉe vortkunmetaĵoj ekzistas la ekstra signifo de specialeco de la kunmeto, kvankam ĝi kutime ne esprimiĝas. Ekzemple "tablotuko" ne estas simple "tuko por la tablo", iu ajn tuko. Ĝi estas "SPECIALA tuko por la tablo", speciale fabrikita por esti sur tabloj, aŭ ĉiam speciale uzata tiel.



Do "Donu al mi TUKON POR LA TABLO" ne necese devas esti "tablotuko" kaj povas esti ia ajn tuko.

Principe tio aplikiĝas ankaŭ al afiksoj, sed tie ofte estas malfacila vidi la specialecon. Jen kelkaj ekzemploj kie la specialeco klare videblas: Se domo estas "grandega", ĝi tamen estas ordinara domo, sed se ĝi estas domo, ĝi apartenas al speciala klaso de domoj. Se domo estas "dometo", ĝi ne estas nur malgranda domo, sed ĝi apartenas al speciala speco de domoj, nome "dometoj". En la etnaj lingvoj oni ofte havas apartan vorton por tiaj specialaĵoj, en la angla "mansion" kaj "cottage". Tiel "pluveto" estas "drizzle" kaj "pluvego" estas "downpour". Same "plendulo" ne hazarde plendas nun, sed havas la plendadon en sia karaktero. Same "manĝeti" kaj "manĝegi" ne estas simple manĝi malmulte aŭ multe, sed "nibble" kaj "gorge".

Marcel Leereveld.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.



La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 20a de februaro estos la tria sabato. Venu!

Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.

Roger Springer



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

La tria mondmilito.

MALPURA MELBURNO (KAJ SIDNEO ?).



Jam antaŭ la apero de la koron-viruso, kiel kaj kial la ŝtata instanco kiu donas la permesojn por konstruado povis permesi ke oni rajtas konstrui hotelojn en kiuj la malpura aero de unu ĉambro povas, per la klimatigistemo, libere iri el unu ĉambro al la alia? Tio en si mem estas malpura permesado de la malpuraj instancoj, eĉ sen la viruso. Aŭ ĉu la konstruindustrio kapablis malpure devigi, unumaniere aŭ alie, la instancojn permesi la malpuran sistemon?

Marcel.

MIA PROGNOZO .

Se la mondo ne devus unue venki la militon kontraŭ la koronaviruso, la tria mondmilito verŝajne jam nunus. La nuna mondon reganta kombino de la bankoj, grandaj kompanioj inter alie la armilfabrikistoj, kaj la usona armeo scias ke se ili atendas tro longe, Ĉinujo estos tro forta por venkobati ĝin. Ili ne publikigas tion, ĉar ili kutimas teni siajn sciojn kaj intencojn nepublikaj, por ne kaŭzi kritikojn. Sed kelkaj registaranoj jam mencias ke "Ĉinujo estas danĝero por nia lando". Kaj efektive Ĉinujo plifortiĝas daŭre, ekonomie kaj armee. Ĝi devas, ĉar ĝi bezonas pli da mondpotenco por povi ekonomie ekzisti. Ĝi ankoraŭ ne estas sufiĉe forta, kaj la viruso verŝajne helpas ĝin ricevi pli da tempo por plipotenciĝi. Se ĝi ne plifortiĝos, ĝia ekonomio kolapsos, kaj ĝuste tiun kolapson celas la usona superpotenco. Se ekzistus sufiĉe da neŭtralaj landoj, tiuj povus devigi senmilitan balancon. Kaj se la mondmilito nun bezonata de Usono venos baldaŭ, ĝi estos terura por la helpantoj de Usono kaj por la helpantoj de Ĉinujo, kaj pleje por la ĉina popolo, kiun Usono terure malriĉigos. Verŝajne Usono uzos Japanujon por organizi tion, ĉar Japanujo havas sperton kiel trakti la ĉinan popolon kruele.

La tria mondmilito, la lasta por longa tempo, detruos gravan parton de nia civilizacio. La venkantoj, la grandaj tutmondaj kompanioj, ree fartos bone post ĝi, kaj kapablos eĉ malpli salajri nin, pro la milita preteksto. Ili povos rekomenci disigi sian potencon super eĉ pli da nun neŭtralaj landoj. Sed la veraj venkantoj, ĉar ili ne bezonis perdi homojn nek armilojn, estos

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Rusujo kaj eĉ pli la islamaj landoj, precipe Irano. Sciante tion, Rusujo jam nun amindumas kun tiuj islamaj landoj. La islamaj landoj sukcesos forte disvastigi sian religion. Tiaj kreskoj okazas tre forte post militoj. Cetere ilia kredo kaj celo estas subjugi la tutan mondon, kaj ili sukcesos pro la kristanismo precipe en Usono. Kontraŭe la kristanismo en Sudameriko kaj Centroameriko havos iom da sukceso kontraŭ Islamo.

Multaj eŭropanoj, kaj eĉ kelkaj tutaj eŭropaj landoj, rifuzos helpi Usonon kontraŭ Ĉinujo. Sed ili ne praktike helpas Ĉinujon en sia militokontraŭstaro. Kaj alilokaj ŝtatoj helpas Ĉinujon donante surteriĝrajtojn. Sed neniuj islamaj ŝtatoj helpas Ĉinujon, ĉar ili scias ke Ĉinujo estas remparo kontraŭ la islamismo.

Krom pro la malmultokostaj kaj bonkvalitaj komercaĵoj, la nura ialo kial mi deziras ke venkos Ĉinujo estas, ke mi juĝas ke la ĉina popolo (ne ĝia registaro), pro sia karaktero de malfanatikeco, estos la sola popolo kiu kapablos haltigi la disvastiĝon de islamo, ĉar tia disvastiĝo retrosendos nian civilizacion je kelkaj jarcentoj.

Marcel Leereveld.

FORLASO DE LA MONTROPONOMO.

Kiel en kelkaj etnaj lingvoj, oni povas forlasi la montropronomon en Esperanto en kelkaj limigitaj kazoj. Tiu forlaso aplikiĝas kiam sekvata de samspeca rilata pronomo, ekz. "TIO, KIO falas, povas rompiĝi" > "KIO falas, povas rompiĝi". Se la du pronomoj estas en malsama gramatika kazo, la forlaso ne aplikiĝas, ekz. "TIO, KION mi lasis fali, povas rompiĝi" kaj "TION, KIO falas, mi devas levi", en kiuj frazoj oni ne povas forlasi "Tio" nek "Tion".

Normale la t-pronomo troviĝas en la ĉefpropozicio, kaj la k-pronomo en la komenco de suborda propozicio. Teorie eblas, ke la t-pronomo estas en suborda propozicio kiu ĉehavas sian subordan propozicion, kiel en "Mi alportas la trinkaĵojn al tiuj, kiuj helpas TIUJN, kiuj batalas la arbarfajron". Praktike tiaj frazkombinoj ne uzatas.

La priparolataj pronomoj povas esti kia ajn frazparto, nome subjekto, objekto, aŭ adjekto. Jen ekzemploj:

SUBJEKTO: "TIU, kiun mi amis, mortis", kaj "Mi amis tiun, KIU mortis".

OBJEKTO: "TIUJN, kiuj venos, mi persone bonvenigos". "Ĉiuj, KIUJN mi invitis, venis".

ADJEKTO: "Li parolis AL TIUJ, kiujn li konis", kaj "Ŝi amis tiun, KUN KIU ŝi edziniĝis".

TRIFRAZA: "Li edziĝis AL TIU, KIU batatadis DE TIU, KIUN ŝi unue edzigis".

Ankaŭ predikativo povas ĉehavi subordan propozicion: "Li estas TIU, KIU trompis min".

Jen estas ekzemploj de la naŭ tabelpronomoj, ĉiu kun la ebla forlaso:

SUBSTANTIVAJ.

IU: Jam donitaj ĉisupre.

IO: "(TIO), Kio falas, rompiĝos"; "Nur (TIO), kio falos, rompiĝos".

ADJEKTIVAJ.

IU: "Mi ne ŝatas (TIUJN PENTRAĴOJN), kiujn pentraĵojn li aĉetis".

IA: "Ne kolektu (TIAJN FLOROJN), kiajn florojn ili kolektis".

IES: "Mi respondos AL (TIES DEMANDOJ), kies demandoj aperis en la gazeto".

ADVERBAJ.

IE: "Ni renkontos vin (TIE), kie atendas la aŭtobuso".

IEL: "Li laboras (TIEL), kiel laboris lia patro".

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

IAM: "Kiam venos niaj gepatroj, (TIAM) ni manĝos en restoracio".

IAL: "Mi ne estas vegetarano (TIAL), kial ŝi estas vegetarano".

IOM: "Donu al mi (TIOM DA SUKERO), kiom da sukero ci prenis mem".

aŭ: "Donu al mi da sukero (TIOM), kiom ci prenis mem".

Cetere ĉiuj montropronomoj povas ĉehavi, antaŭe aŭ malantaŭe, la adverbbon "ĉi".

Marcel Leereveld.



Subtenu Mondon sen Milito

[World BEYOND War <info@worldbeyondwar.org>](mailto:info@worldbeyondwar.org)

Devigu la militistojn ludi ŝakon, ne militi. Protektu la mondajn loĝantojn.

Roger Springer



Senkulpaj Viktimoj de Pafiloj

La mortigitoj, la vunditoj, iliaj familanoj kaj amikoj, ĉiuj civitanoj, la malsanulejoj, la homoj kiuj

prizorgas la viktimojn, impoŝtpagantoj kies impoŝtoj pagas por la riparoj de homoj, aliaj damaĝoj, la leĝaj kostoj, ktp.

Roger Springer



**Estas
Mona
Afero**



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Dankon al Paul Desailly AE517

Dankon kara Paul, pro via komento. Mi pensas ke pli kaj pli multnombraj homoj komencas kompreni la veran historion de la homaro, kaj konkludi ke estiĝis amaso da viktimoj pro batalado kontraŭ diversaj mondimperioj. Vi bone komprenis ke mia mesaĝo estas, ke indus solene rememori ĉiujn viktimojn kiuj agadis por plibonigi la mondon.

Mi ĉeestis la SAT kongreson en Barcelona kaj konstatis kun ĝojo ke multaj SATanoj opiniis simile.

Amike via Gabor (Gabrielo en esperanto)

Gabor Markus



"Australiaj Esperantistoj" miaopinie pli kaj pli legindas.

Paul Desailly

VIKTIMOJ DE LA MONDO UNUIĜU!

la dekduan de februaro 2021

En Aŭstraliaj Esperantistoj (AE517) aperis antaŭ hieraŭ verkita de iama "estro de la hungara parlamenta kontrolo kaj aŭditora organizo" gravajn informojn.

* "Mi mencias ke en Hungario estas oficiala memortago por memori la viktimojn de komunismaj diktaturoj. Krome estas ankaŭ memortago por memori la viktimojn de naziismo. Laŭ "Le livre noir du communisme" cent milionoj da homoj estiĝis viktimoj de diversaj komunismaj reĝimoj. Estas konate ke amase estiĝis viktimoj dum la tuta homa historio, ekzemple kiam okcidenteŭropaj landoj koloniigis Afrikon kaj amase kaptis sklavojn por vendi ilin al amerikaj blankaj farmeroj. Ankaŭ amase estiĝis viktimoj kiam oni okupis Amerikon kaj Aŭstralion, kie granda parto de la origina loĝantaro pereis, ktp, ktp. La homa historio estas historio de militoj kaj bataladoj. Bonvolu legi mian eseon pri tiu temo titolita "Paco kaj militoj en Eŭropo post la dua mondmilito" en www.verkoj.com/verkistoj/markus-gabor/ se vi interesiĝas pri tiu temo. Gabor Markus.

Simile saĝaj vortoj aperis en sameldona artikolo de Franciska titolita *la 26a de januaro*: "Ĝis ne estas rekono de la vera historio de Aŭstralio, la eventoj pri kiuj certa grupo fieras, restos sufero por la aliaj."

Kaj, jen tre saĝe aperis en AE516, verkita de malavarulo kiu senpage elsarkas miajn E-gramatikajn erarojn: "Ĉu ne estas la tempo por aldoni memortagon kontraŭ homa krueleco?" Peter Weide.

Kio instigis min en la lasta semajno pripensi maljustajn historiajn kaj politikajn eventojn estas eseo aperinta sur paĝoj 12-15 de la numero 1387-1388 de *SENNACIULO* kaj senpage tie: <http://komunistoj.esperanto-mv.pp.ru/artikoloj-hegyi-imperiismo-kaj-socialista-maldekstrularo-2020-09-03>

Ĝi titolas jene *Imperiismo kaj la socialista maldekstrularo tempe de la nova malvarma milito* — modelstile esperantigita far SATano Janos Petik elde originala eseo de Hegyi Gyula, samlandana politikisto hungara, kiu esence konjektas baldaŭan kolapson de usona imperiismo. "La gigantiĝinta ŝuldo Amerika, la fiiĝo de la enlanda infrastrukturo, la teĥnika-sciencia detruigo en kelkaj branĉoj kaj la kreskanta malkontenteco socia aperas kiel permanenta krizo."

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Oni do supozu, ĝuste laŭ mi, ke multaj aliaj mondopartoj jam suferas kaj en jaro de plena transiro, eble 2021, tre suferos. Mi, kiel esperantisto kiu kutime ne emiksiĝas en politikaj analizoj, engaĝiĝas nun ĉar, kiam la financa kaj kultura imperio de Usono trapasas la saman fin-vojon de ĉiuj antaŭaj imperioj, tiam la nuntempa populareco de la usona varianto de la angla lingvo probable alfrontos ĝuste saman ekzamenadon kiun devis travivi la rusa lingvo je la subita kaj ne antaŭvidita morto de la sovet-imperio antaŭ 30 jaroj. Parenteze kaj hazarde, sur Ruĝa Placo en Moskvo, kiam en 1990 okazis la ne plu festata memortago por celebri la Oktobran Revolucion de 1917, mi propraokule spektis la kaoson de reĝimo-kolapso: https://eo.wikipedia.org/wiki/Oktobra_Revolucio **Paul Desailly**



Kio estas Mono? Ĉu mono estas la havebla energio en la mondo?

Ĉu homa aŭ besta Laboro? La Suno? Vento? Gravito? ktp. aldonatas ankaŭ la rezervejo de energio de antaŭaj jaroj Oleo? Gaso? Karbo? Atomo?

La bankmonoj (banknotoj, komputilaj ciferoj) estas ligitaj al energio, Ili devas egali al energio. Landaj kontekspertizistoj balanciĝas ĝin sed se ne, la Inflacio kaj malinflacio kontrolas tion. Do la monda problemo estas kiel ĝuste dividi tiun monon al la Homaro por ke ĉiuj povu vivi feliĉe.

Uzo de la rezervejo de energio de antaŭaj jaroj Oleo? Gaso? Karbo? Atomo? riĉigas la homaron, **sed bedaŭrinde ne ĉiujn, kaj detruas la planedon.**

Universala baza enspezo (UBI)

Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Universala baza enspezo (UBI) estas simpla ideo: perioda konstanta pago senkondiĉe transdonita al ĉiuj individuoj, sen rimedo-testado aŭ labora postulo. **Roger Springer**



Tio helpas solvi multajn nunajn problemojn de la tuta Homaro.




Ni bezonas novan manieron pensi, se la homo povos postvivi. **Albert Einstein**



Anonco de la Melburna Esperanto Asocio

La jarkunveno de la Melburna Esperanto Asocio por la jaro 2021 okazos ĉe Ross House, 247 Flinders Lane je 6.30 ptm, lundon la 1an de Marto. La maniero eniri Ross House ŝanĝiĝis, do kiam vi alvenos, bonvolu telefoni Heather 0419895934 por ke ni malfermu la pordon por vi.



Esperante ni bonvenigos multajn membrojn ĉe la kunveno. **Heather Heldzingen**



3ZZZ. La elsendo de la 15a de februaro priskribas diversajn manierojn uzi sian

imagopovon por elteni la malfacilaĵojn de nia mondo, de la novaj religioj al la "telefono de la vento" aŭ desegnaĵo de Amabie. **Franciska Toubale**



La tialo pro kiu mankas informo pri via klubo estas ke via klubo ne sendis ĝin al AE

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE